nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2016

## PUBLIKIGITA LA PROGRAMO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Estis jam publikigita en la retejo de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, la detala programo de la evento, kiu fine de junio komenciĝos en Herrera del Duque (Ekstremaduro). Legu ĉe: http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/programo.

La kongreso estos speciala, pro la kvanto kaj kvalito de la invititaj artistoj, ĉu en muziko, teatro, literaturo, aŭ la granda varieco de prelegoj. Ankaŭ estos tre altira la turisma programo, kiu ebligos nin konatiĝi ne nur kun Herrera kaj ties distrikto (konata kiel "La ekstremadura Siberio"), sed ankaŭ kun Guadalupe kaj ties monaĥejo, kaj la urboj Trujillo kaj Cáceres.

Memoru ke jam la 29-an de junio komenciĝos Seminario por Aktivula Maturiĝo, kun la celo trejni aktivulojn kaj organizi kunlaborajn agadojn por la lingvo.

Por ĉiuj detaloj, ankaŭ praktikaj, indas viziti la retejon http://www.esperanto.es/kongreso, aŭ kontakti la adreson kongreso@esperanto.es.

## PRESKAŬ ANTAŬKONGRESO EN MADRIDO

Ĉar por multaj kongresanoj, precipe loĝantaj ekster Hispanio, la plej bona maniero aliri la kongresurbon estos tra Madrido, kaj ĉar pluraj profitos la okazon por pasigi kelkajn tagojn en Hispanio, oni planas organizi diversajn aktivadojn en Madrido la tagojn antaŭ la komenco de la Kongreso de Herrera del Duque.

Kiel ni jam anoncis en antaŭa numero de la bulteno, estas jam organizita por vespero de la 28a de junio, mardo, la "Tria Bohemia Nokto", literatura programero surbaze de la itinero trairita de Makso Stelo kaj S-ro Latino de Hispalis, la protagonistoj de *"Bohemiaj Lumoj"*. Iom antaŭe, je la 6-a vespere, en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, oni planas organizi Festo-Renkonton por bonvenigi la vizitantojn. ekster-madridajn. Ni informos pri la detaloj de ambaŭ eventoj en postaj mesaĝoj.

Oni planas ankaŭ organizi aliajn turismajn itinerojn tra Madrido, por la 27a aŭ 28a de junio. Pri tio, atentu la retlistojn kaj forumojn, por koni la horon kaj lokon de komenco.

Eblas ankaŭ organizi koncerton aŭ alian kulturan aktivadon, por la vespero de la 27-a, sed ne ekzistas definitivaj planoj ĉi-respekte. Se iu el niaj legantoj konas koncertejon, kultur-centron aŭ drinkejon kie eblas organizi malgrandan koncerton, bv. kontakti kun Madrida Esperanto-Liceo, por esplori la eblecojn.

## TRANSPORTO AL LA KONGRESO KAJ GASTIGADO

Legantoj bv. kontakti kun MEL ankaŭ se vi povas kaj pretas gastigi eksterlandajn vizitantojn dum iuj tagoj antaŭ la kongreso.

Ni ankaŭ esploras eblecojn por komunaj vojaĝoj el Madrido al Herrera per privata aŭto. Bv. sinanonci en la retforumoj se vi pretas kundividi la vojaĝkostojn en aŭto, aŭ skribu al la adresoj de MEL madrid@esperanto.es aŭ de tiu ĉi redakcio niavocho@gmail.com.

Ĉiukaze, kiel ni anoncis, la organizantoj luos du busojn por la partoprenantoj (ĝi kostos po inter 10 aŭ 15 € /individuo), kiuj ekiros al Herrera la 29an junio je la 8:00 matene por tiuj kiuj partoprenos en la AMo-seminario kaj la 30an junio je la 15:00 por ĉiuj aliaj. Kontaktu la organizantojn ĉe kongreso@esperanto.es se vi interesiĝas pri tiu alternativo.

## INTERNACIAJ KONGRESOJ

La Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare atingas sian 101an eldonon, disvolviĝos inter la 23a kaj 30a de julio 2016 en la slovaka urbo Nitro (Nitra), sub la moto "Socia justeco – lingva justeco". Pliajn informojn en: http://www.uea.org/kongresoj/UK

La 72a Internacia Junulara Kongreso celebriĝos inter la 16a kaj 23a de julio 2016, en Vroclavo (Wrocław), Pollando. Pliaj informoj: http://ijk2016.tejo.org/

En la samaj datoj, 16 ĝis 23 de julio, okazos en Herzberg-am-Harz, Germanio (la Esperanto-urbo), la 89a Kongreso de SAT: http://www.satesperanto.org/Bonvenon-al-Hercbergo.html

## VIDEOJ DE LA INTERNACIA TAGO DE LA LIBRO

Eblas jam spekti en la reto filmetojn de la aktivaĵoj organizitaj en Madrido okaze de la Internacia Tago de la Libro, pri kiuj ni informis en nia pasinta bulteno.

La legado de du pecoj en Esperanto, ene de la tradicia sinsekva kompleta legado de la verko Donkiĥoto, de Miguel de Cervantes, en institucio Círculo de Bellas Artes estas spektebla kaj aŭskultebla en: https://www.youtube.com/watch?v=jqGB3_72KHM.

En https://www.youtube.com/watch?v=2vBmkst-qi4 eblas spekti la prezenton, en kvartalo San Fermín, de la antologio "Nova mondo en niaj koroj", de poezio tradukita al Esperanto, kun la ĉeesto kaj deklamado de nuntempaj kritikaj hispanaj poetoj, kelkaj esperantlingvaj.

## EN MAJO OKAZIS ...




Miguel Fernández prezentis la verkon "Bohemiaj lumoj" ene de kultura okazaĵo JACA (*Jornadas de Arte y Creatividad Anarquistas*) [esperante, RAAK (Renkontiĝoj pri Anarkiismaj Arto kaj Kreivo)] la pasintan 14an de majo, en centro uzata de liberecanaj grupoj por kulturaj aktivadoj, EKO en Karabanĉelo.

Kelkaj esperantistoj komencis partopreni la kunvenojn de multlingvuloj organizitaj en Madrido (*Polyglot Meetup Madrid!*), iujn dimanĉojn en la parko Retiro. Temas pri bona loko por praktiki lingvojn kaj ankaŭ disvastigi la internacian. Pliaj detaloj ĉe: http://www.meetup.com/es-ES/Meetup-Expats-in-Madrid-Madrid/events/230666914/.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30. La venonta sabata babilado okazos la 4-an de junio. Atentu forumojn kaj sociajn retojn por koni la detalojn.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com